

II-a Medicinista kunveno en Ĉeĥoslovakio

Medicinista sekcio de Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato elkore **i n v i t a s v i n** al Esperantista internacia renkontiĝo en ĉeĥoslovakian banlokon Poděbrady, 53 kilometrojn oriente de la ĉefurbo Praha, sur rivero Labe.

En kadro de grandaj urbaj festoj okaze de 50 jara ekzisto de Ĉeĥoslovakio kaj okaze de la 60 jara fondiĝo de konata banloko de kormalsanuloj, Esperantista klubo de ZV ROH Ĉs. státní lázně Pobebrady aranĝas la

8-an ESPERANTISTAN RENKONTIĜON kaj la

3-an INTERNACIAN ESPERANTISTAN ŜAKTURNIRON la 21an - 30an de junio 1968.

La INTERNACIA ESPERANTISTA ŜAKTURNIRO okazos tage kaj estos pliriĉigita per ĉiutaga alia programo: interkonatiga vespero, partopreno ĉe la festarangoj de la banloko, lumbildprezentado pri Praha, akcepto de urbestro, vizito de la kastelo kaj muzeo, vizito kaj banado en la banejo, Itala vespero, ekskurso al Kutná Hora (iama ĉeĥa reĝa urbo), vizito de vitrofabriko (bohema kristalo), sekreta ekskurso.

Medicinista sekcio de ĈSEK aranĝas sabate la 29-an de junio 1968 je la 13a horo medicinistan kunvenon. Programo:

1. Trarigardo pri la laboro de medicinista sekcio.

2. Eldonado de fakaj presaĵoj kaj de la gazeto.

3. Scienca seminario - sciigoj kun sciencaj, popularaj, socialaj, rugkrucanaj, flegtekni- kaj aliaj temoj (daŭro 10-15 min). Sciigoj ne devas esti originalaĵoj, sufiĉas referaĵoj, tradukaĵoj esprantigitaj. Dezirataj estas ankaŭ prelegoj pliriĉigitaj per diapozitivaj.

4 Diskuto.

Post la kunveno vizito de banloka esplora instituto kun faka klarigo en internacia lingvo. 18-a h.:

Komuna vespermanĝo

19,30 h.: Kultura vespero.

30.VI. 1968-dimanĉo 9-a h.: Sinekskurso sur la rivero Labe - amuzaj ludoj- komuna tagmanĝo.

Loĝado en hoteloj - kategorio B, C au en privato.

Al seriozaj interesuloj ni sendos detalan programon, kun aliĝilo por loga servo.

Detranĉu ! •••

A l i ĝ i l o (sendu afable al la sekretario : Dro Josef Hradil, Český Dub 137/III, o. Liberec

N o m o :

Adreso:

Mi partoprenos en tagoj: 21.VI., 22., 23., 24., 25., 26., 27., 28., 29., 30.VI.1968 (event.forstreku!)

Mi veturos sole, kun familianoj.

Mi bezonas pluajn informojn pri vizito de P r a h a (Prago), kiun mi intencas viziti kaj tranokti en tagoj

Mi povus prelegi pri: (temo)

Daŭro: minutojn.

Karaj ĉeĥoslovakaj gekolegoj,

ĝla tempo de nova medicinista renkontiĝo, kiu okazos en Poděbrady.

Tial ni sendas vin novan invitilon kaj esperas, ke ni multaj kunvenos kaj faros pluajn progresajn paŝojn. Kvankam ni ne sukcesis ĝis nun eldoni memstaran fakan gazeton, ni almenaŭ eldonis kelkajn medicinistajn presaĵojn, kiujn vi ĉiuj ricevis. En lastaj tagoj Ministerio de saneco fake ellaboris ekspertizon pri eldonado de esperantlingvaj presaĵoj kaj rekomendis eldonadon de memstara gazeto kondiĉe ke ĝi estos sufiĉe reprezentativa (almenai ofsetita). Dedido nun bazigas en manoj de Ĉs. ústředí knižní kultury a tisku kiel ĉefa preskontrolo organo, kaj ni esperas pri fina sukceso. Por plifortigi nian eldonfonduson ni almetas pagilon kun peto pri via afabla subteno.

Antaŭdankon !

Medicinista sekcio de ĈSEK sekretario: MUDr Josef Hradil,

S. Marie Polášková, Vsetín, nemocnice, I. Interna

MEDICINAJ PAĜOJ

Niaj sciigoj: S-ano Jozefo Ed. Ambrož /BRNO – 15, Špačkova 3/ multobligis sian raporton "Aktuala situacio en la sociále sanitara zorgo pri handikapuloj per internaj malsanoj " kaj sendos ĝin al interesuloj.

Ĝi ampleksas 6 paĝojn.

D-ro Jozefo Hradil /ČESKY DUB 137/111» okres Liberec/ tradukis kaj multobligis la artikolon de D-ro J. Dostál kaj D-rino L. Szelig: "Kuracado per oksigena superpremo"/hiperbara oksigenoterapio/. Ĝi estas 5-paĝa kaj enhavas ankaŭ la liston de la ĉi-rilata literaturo. Interesuloj povas skribi al li petante alsendon.

D-ro J. Hradil kompilis Medicinan vortareton ĉeĥan-esperantan kiel helpan vortareton por tradukantoj. Kontrolis kaj kompletigis ĝin D-ro Jozefo Černý. Bedaŭrinde la vortareto troviĝas nur en manuskriptoj ni esperu, ke nur provizore.

D-ro Imre Ferenczy, fervoja ĉefkuracisto en Győr» poŝtfako 143, Hungario, salutis la Esperanto-rondeton ĉe Kuracista Fakultato en Martin kaj deziris sukcesojn en ĝiaj fakaj laboroj. Li esprimis la esperon, ke ankaŭ en Hungario disvolviĝos vigla Esp. vivo inter liaj gekolegoj. Samtempe li promesis sendadi fakajn artikolojn pri medicinaj temoj.

Nia diskuto El la letero de D-ro A.Kapusi a Prof. B. Popovic, ĝenerala sekretario de ISAE ni citas: "...ĉe ni en Mez-Eŭropo estas sufiĉe vasta reto de ISAE kaj SR, la plej granda nombro da sciencistoj-esperantistoj, organizitaj aŭ ne bone funkciantaj asocioj, historiaj tradicioj komunaj kaj la nuna historia kaj politika atmosfero eksplikas la fakton, ke ĉi tie en la Danubregiono la grupo da frataj landoj estas la plej vivokapabla kaj perspektivoplena kerno por la tuta ideo de internacia kunlaboro inkluzive la esperantistan medicinon. Bonvolu ekzameni la abonantaron laŭ la regionoj de la SR, tio klarigas ĉion. La medicinista sekcio de Hungara Esperanto-Asocio nombras 30 membrojn, tiu de la ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato same 32, en aliaj najbaraj landoj oni proksimume la samajn fondiĝojn povas atendi, se ni povos kontribui per realaj stimuloj. Do, ĉi tie estas la kerno ĝermanta, kies evoluo dependas nur de bone celantaj apogoj. La rubrikon en SR mi konsideras nur transira solvo, ilo por esplori niajn eblecojn, por varbi kunlaborantojn kaj abonantojn kaj por havigi al ni montreblajn realigojn, surbaze de kiuj ni povos poste postuli pli vastajn eblecojn kaj memstaran medicinan revuon..."

El la respondo de D-ro Popovic al D-ro Kapusi ni citas:

"Koran dankon pro Via letero de 31-a de decembro. El ĝi mi eksciis, ke en Budapeŝto estis diskutita la afero de medicinistoj sur iu bazo ĝis nun nekona al mi. Sed ĉu tie oni konkludis ion, kion sekvas la medicinistoj, almenaŭ ilia granda parto? Aŭ ĉu estas via deziro fari tiel kaj Vi puŝas la aferon tiudirekten? Mi timas displitiĝon de la movado inter medicinistoj, kvankam mi konfesas, ke UMEA faras tre malgrandan laboron. Kaj mi neniel deziras, ke morgaŭ oni ataku ISAE pro tia disŝiro inter la medicinistoj, almenaŭ ne min, kiu estas ĉiam por konkorda laboro. Aliflanke mi neniel deziras bremsi la aktivecon, kiu povas esti fruktodona, sed nur sub la kondiĉoj, ke oni agu prudente, ke oni ne saltu antaŭen sen sufiĉa forto. Entuziasmo ne sufiĉas en tiuj aferoj. Eĉ fondiĝo de la "Sekcioj" ne multon signifas, ĉar ili povas jam morgaŭ ne ekzisti, se ekz... ilia vivo dependas de la laboro de unu homo, kiu subite ĉesas labori. Kaj la ekzisto de Medicina Internacia Revuo eĉ tia, kia ĝi estas, estas unu el niaj sukcesoj, kiun ni ne rajtas detrui, nur kiam ni kreos ion pli fortan kaj pli stabilan!

Jen, pro kio mi ne povas akcepti, ke oni gvidu tiaspecan laboron sub la flago de ISAE. Sed aliflanke mi ne rifuzos la kunlaboron de medicinistoj, kiuj pro io ajn funkcias ekster la kadro de UMEA, kiel individuaj membroj de ISAE. Bonvolu interkonsenti kun aliaj landaj medicinistaj sekcioj, ke ili funkcii, iliaj membroj ankaŭ verku artikolojn por SR kaj legu ilin /pro tio kompreneble fariĝu membroj de ISAE/. Tiajn artikolojn ni metos unu post la alian en SR /sed sen aparta "medicina rubriko"/

La ĉefa afero estas unue montri, ke la grupiĝo povas vivi kaj kreski - ne detrui ion jam ekzistantan antaŭ ol la nova montriĝos vivkapabla. Ne forgesu viajn proprajn vortojn "per bone pripensita plano ni povos certe fari ion." Kaj entuziasme ne egalas al la pripenso de la plano! Nek Rumanio, nek Hungario solvis la problemon de la pagoj al ISAE! Ĉeĥoslovakio solvis ĝin, sed tamen la nombro

da abonantoj ne kreskis post fondo de la medicinista sekcio! Jen realeco, konstante frapanta nin!
Pripensu kaj agu, sed "trifoje pripensu antaŭ la tranĉo!"

Esperanto agado 1967/5

Esperanto, poŝtfako 80, MARTIN,

ĈSSR

R U Ĝ K R U C A R O

Rim de la red. Ni enkondukis novan rubrikon por favorantoj de la ruĝkrucana ideo, kiuj intencas uzi la Internacian lingvon kiel ligilon. Pardonu la modestegan eksteriĝon de nia cirkulero. Ĝis kiam ni ne sukcesos akiri sufiĉan subtenon flanke de nia legantaro, ĝi povos aperadi nur laŭ niaj eblecoj kaj neregule. Tamen io estas pli ol nenio. Bonvolu, ni petas, sendadi al ni viajn kontribuojn originalajn aŭ tradukintajn, pri kiuj vi opinias, ke ili povus interesi ankaŭ la ceterajn niajn legantojn. Krome bonvolu rekomendi nian cirkuleron al viaj konatoj ka jĉiamaniere helpi la disvastigadon de nia ligilo! Antaŭdankon.

Ruĝa kruco internacie: RK en Jordanio havas porjunularan klubon. Ĝi arigas knabojn 9-16-jarajn por ĉeisig ilian vagabondadon tra la stratoj. La klubejo esas malfermita dum 5 kaj duontago semajne kaj al siaj vizitantoj donadas tagmanĝojn, projektadas filmojn, aranĝadas ekskursojn, diversajn ludojn kaj ebligas al ili preparon por la lernejo.

RK en Barmo aranĝadas en ĉiuj lernejoj kursojn pri hejma kuracado de malsanuloj.

Nederlanda Ruĝa Kruco disdonis 45 000 signal-insignojn al maljunaj kaj forlasitaj personoj. En kazo de neceso ili metas la signal-insignojn en la fenestron por atentigi la ĉirkaŭirantojn, ke ili bezonas helpon.

Rekordon al varbado atingis la Filipina RK. Laŭ la statistiko de la Ligo de RK jam en 1964 ĝi atingis

16 600 000 da anoj, el tio 6 000 000 da junularo. Tio tiam estis la duono de la loĝantaro.

Franca RK havas proksimume 1 500 salajritajn sanitariistojn. Ili laboras en t. n. sanitariaj centroj kaj institutoj, en prizorgado de malsanuloj en iliaj hejmoj, la sociala servo, en lernejoj, en la aviad-servo, en sanitariaj automobiloj, ja eĉ eksterlande.

La domaĝoj, kiujn kaŭzis uragano en la insulo Samoa instigis la Ligon de RK peti la Organizon de Unuiĝintaj Nacioj pri altigo de la financa helpo okaze de katastrofo el 20 000 da dolaroj je 100 000 por unuopa stato kaj katastrofo.

Lakto el plantoj. En Britujo ekde 1957 daŭras la eksperimentoj pri produktado de lakto el la verdaj folioj de plantoj, per eltirado de 50-70% da proteino kaj ĝia blankigado kaj preparo por manĝado.

Laŭ "Oesterreichische Apotheker Zeitung" tiu ĉi metodo estas jam industrie uzata. La sciencistoj volas produkti la ĉi specan lakton en formo de pulvoro anstataŭ la ĝisnun preparata kaĉo.

Ne nur la homaro. Kuracistoj ĉiam pli intense interesiĝas pri la influo de nutraĵoj je ekesto de angiomalsanoj kaj perturboj de metabolismo. Ĉi-rilate estis trovita tre interesa simileco inter la bildo, klinika, da aterosklerozo ĉe homoj kaj bestoj, konkrete bovoj. La gazeto "Das Krankenhaus" mencias, ke grupo da kuracistoj, bioĥemiistoj, sukcesis finbredi specialan specon de bovo, taŭga por eksperimentado pri ekesto de arteriosklerozo. La ĝisnuna intereso de la eksperimentoj estis direktita al la metabolismo de graso, sed nuntempe al la ambaŭflanka influo de graso kaj karbonhidrata metabolismo. La eksperimentoj montras, ke nia nutraĵo grave sanĝiĝis per tio, ke ni manĝas purigitajn amelaĵojn facile digesteblajn. La plej gravaj problemoj atendas la esploradon rilate la infannutraĵon kaj tiun de maljunuloj, ja eĉ de laboristoj, kies okupo estas tre pretenda kontraŭ la organismo.

Viroj kaj korinfarkto. Duono de la vira loĝantaro de Okcidenta Eŭropo suferas pro korinfarkto, kiel deklaris D-ro Epstein el la universitato en Michigan. Laŭ la gazeto Krankenhaus Umschau la plej grandan inklinon al infarkto havas la honoravidaj viroj /3,5-foje pli grandan/, plue viroj vivantaj inter malfacilaj familiaj rilatoj /5-foje pli grandan/ol viroj vivantaj en trankvilo. El inter la manlaboristoj malsaniĝas plej ofte metallaboristoj, gvidistoj kaj konstruadlaboristoj. Majstroj kaj kvalifikitaj laboristoj 7-foje pli ofte ol nekvalifikitaj.

Internacia tago de surduloj okazis la kvaran dimanĉon en septembro pasintjara. Ĝi estas organizata laŭ la iniciato de la Monda Ligo de Surduloj ekde la jaro 1958. En Ĉeĥoslovaka Ligo de Invalidoj estas organizitaj preskaŭ 10 000 da aŭdosense difektitaj. 300 iliaj delegitoj partoprenis la tutŝtatan

kunvenon okaze de la Inter-nacia tago de Surduloj, en la moravia Gottwaldov. Ili vizitis ankaŭ la fabrikon S v i t, kie laboras pli ol 200 da surduloj. La entrepreno obligis al ili ankaŭ la plialtigo de ilia kvalifiko.

Fina redakcia noto! Nur tiom ni povis provizore aperigi kaj nun atendas la eĥon, laŭ kiu ni procedos venontfoje. Ĝis la!/
v-15- 81064 OKSM-122/68